Estimataj partoprenantoj de la kongreso!

Ni gratulas vin, okaze de la malfermo de la 24-a kongreso de UkrEA kaj la festa inaŭguro de la memortabulo al Vasilij Eroŝenko. Tio estas tre grava evento, kiam oni omaĝas tiom grandajn homojn el nia movado. Nia familio ankaŭ kontribuis al la diskonigo de la memoro pri Eroŝenko, kiam Aleksandr kaj Elena Ŝevĉenko eldonis en la iama eldonejo "Progreso", lian verkon "El vivo de ĉukĉoj". Granda poeto, verkisto, esperantisto, instruisto - li estas bona ekzemplo, kiel malgraŭ ĉiuj vivaj obstakloj eblas ne nur elvivi, sed ankaŭ porti al la homaro multe da novaj scioj.
Ni deziras al la kongreso sukceson kaj fruktodonan laboron por nia komuna lingvo - Esperanto.

kore,
Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova,
redaktoroj de la revuo "Esperanto", kunordigantoj de la Esperanta eldonejo "Impeto"